

Oriento-Okcidento analizita

Analizo kaj komentario de Stefan MacGill en la 30-a de majo 2022.

Ĉiu tiu transkultura eldona serio de UEA estas brava, unika kaj valora. Ĝi enplektis absolute gravajn verkintojn, eldonistojn kaj tradukintojn. Rimarkindas, kiom internacia estas la pretiga vojo de verkoj al la serio. Kunlaboras homoj el tute malsimilaj kulturoj kaj talentoj. Tial, ege malfacilas asigni verkon en la serio al difinita mondparto. Tio ne bremsas min. Kie eble mi elektas la landon, kies kulturo estas prezentita, pli ol la eldona lando. Jen la konciza versio de mia analizo

Oriento:

Sume 16 verkoj el la 60. Sep en Japanio, ses en Ĉinio, du en Barato (Hinda Unio), kaj unu en Vjetnamio. Sed kie estas Koreio, Nepalo, Mongolio, Tajlando, Laoso, Pakistano, Uzbekio, Taĝikio, Kazaĥio, Israelo, Indonezio, Filipinoj, Malajzio, Singapuro, Bangladeŝo, Srilanko. Ĉu ili vere ne havas indajn kulturojn? Kial la orienta reprezentiĝo estas tiom malekvilibra? Superregas la aziaj landoj kun frue maturiĝintaj Eo-komunumoj.



Okcidento:

Sume 39 el la 60. Elstare Nederlando 5, Rusio 5, Germanio 4, Hispanio 3, Francio 3. Mankas eroj el Belgio, Svislando, Luksemburgo, Ukrainio (eldonis multegajn valorajn verkojn), la Baltaj ŝtatoj, Islando, Albanio, Bulgario, Rumanio, Slovakio, Grekio, kaj la novaj sudslavaj ŝtatoj. Denove, superregas la eŭropaj landoj kun fortaj Eo-komunumoj (malsurprize, sed kiel sproni plian tutmondecon?).


Mezoriento:

3 eroj el 60. Unu el Turkio kaj du el Irano (la persa kulturo).

Numeroj 51, 58 kaj 60.

Oceanio:

1 ero el 60. Verko 25 Aŭstralia antologio



Konkludoj:

La okcidento superpezigas ĉiun alian regionon: Okcidento 39, Oriento 16. La pliaj mondpartoj apenaŭ aperas, kaze de Latinameriko kaj Afriko, plene ne aperas. La serio mirinde sukcesis en sia tempo, sed ĝi ege neglektis la kulturen riĉecon de ĉiu mondparto kaj la tutecon de la monda kulturo. UEA devas ankaŭ ĉi tie ege labori por pli bone meriti la epitetojn 'tutmonda' kaj "universala".

Rekomendoj al la kultura fako de UEA

- Lanĉu la eblon por reta aperigo de verkoj en la serio. Tio mildigos la financajn malfacilaĵojn por eldoni verkojn el indiĝenaj kulturoj kaj la netuŝitaj regionoj.
- Kontakti la eldonintojn de fizike elĉerpitaj titoloj, por akiri la permeson reeldoni la verkon elektronike.
- Multaj ankoraŭ akireblaj verkoj de la serio ne havas recenzojn. Mendu recenzojn aŭ donu ligojn al artikoloj aperintaj en malnovaj numeroj de revuo *Esperanto*.
- Minimume indas verki kaj aperigi 5-6-linian resumon pri la vendataj libroj en la serio por sproni la mendojn kaj la interesiĝon.

AMO paŝas en la breĉon

Tial elpaŝas la AMO-programo de UEA. Ĝi elstarigos per AMO 86 en la 12-a de junio la neglektatajn kulturojn de Oceanio. AMO 90, en la kadro de UK, larĝigos tion kun la temo "Kulturaj trezoroj ekster Eŭropo" kiu fokusos la atenton al indiĝenaj kulturoj en Kanado (la kongreslando) kune kun tiuj el Latinameriko, Afriko, la neglektataj partoj de Azio kaj Oceanio.

La seria nomo restu 'Oriento-Okcidento. Sed ni devas konigi la fakton, ke proponoj ankaŭ el la nordo kaj la sudo bonvenas!

Ĉefa fonto:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Serio_Oriento-Okcidento

Alia fonto:

Dima S kaj Anna S informas, ke en la maja numero de revuo *Esperanto* aperas dupaĝa kompleta listo de la serio kun indikoj, kiuj titoloj elĉerpiĝis kaj kiuj ankoraŭ estas mendebaj ĉe UEA – (sur paĝoj 116-117).



Ĉi tio estas prepara dokumento por AMO 86 kaj AMO 90

AMO 86: Esperanto por peri Oceaniajn Kulturojn.

AMO 90: (en la UK): Kulturaj Trezoroj ekster Eŭropo.